VĚSTNÍK
BULTENO de ĈAE

ČERVENEC 1929 JULIO

SVAZU ČESKOSLOVENSKÝCH ESPERANTISTŮ
ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

## *Našim členům a přátelům!*

Výbor „Svazu" vzhledem k mimořádným vnitřním poměrům, nechtěje více přepínati trpělivosti svých příslušníků a příznivců, usnesl se na samostatném vydávání svého „Věstníku", aby členům svým a přátelům esper. hnutí poskytl nejen obraz své činnosti, nýbrž i zprávy o rozvoji esperanta vůbec.

Toto číslo za nového vedení, bez dostatečného času k přípravě a k získání i roztřídění potřebného materiálu, nebude snad ve všem vyhovovati. Prosíme za shovívavost a ocenění aspoň dobré vůle, jež stávající neudržitelné poměry chce zlepšiti. — Redakci jsou v tom ohledu vítány všecky pokyny a spolupráce všech klubů i jednotlivců, záleží-li jim na opětném rozkvětu „Svazu", jenž musí nastoupiti správnou cestu svého poslání, aby nebyl zatlačen do pozadí pracovníky snad zdatnějšími!

Sdělte bez obalu svá mínění redaktoru tohoto věstníku, aby nastalo vyjasnění celé situace tak žádoucí pro další postup a rozvoj esperantského hnutí v Československu. Ing. B.

## *Al niaj membroj kaj amikoj!*

La komitato de ĈAE sciigas, ke „La Progreso" ĉesas esti ĝia oficiala organo, kaj ke ĝi de nun eldonos memstare sian „Bultenon de ĈAE", kiu raportos unuavice pri l'agado de ĈAE, sed ankaŭ informos pri l'tuta E-movado en ĈSR kaj citos ĉiujn gravaĵojn de E-movado tutmonda.

Nia bulteno do estos grava informilo por ĉiuj aliaj E-gazetoj kaj ĉerpa fonto eĉ por nacilingvaj ĵurnaloj. Ni do ĝin sendos al ĉiuj E-redakcioj elpetante interŝanĝajn ekzemplerojn kaj informojn pri alilanda E-movado.

Kun plej bona espero ekiras la nova redakcio sian vojon kaj deziras renkonti survoje bonajn amikojn kaj bonvolajn helpantojn, kiuj subtenus per siaj informoj, konsiloj kaj manuskriptoj la malfacilan laboron de l'redaktoro.

Inĝ. B.

## AGADO DE ĈAE

Generala kunveno de ĈAE okazis tiun ĉi jaron en Pardubice, la 17.-an de marto kaj estis elekta jena gvidantaro por la jaro 1929.-a:

### Komitato.

Membroj:

Jos. Eiselt, reg. konsilanto, Vinohrady, Slezská 68, kiel prezidanto,
Dro Stan. Kamaryt, profesoro, Bratislava, Tělocvičná 3, kiel vicprezidanto,
Rud. Hromada, oficejestro, Praha VII., Sochařská 333, kiel ĝen. sekretario,
Robert Bloch, poŝt-oficisto, Smíchov, Pouk. ústř. minist. poŝt, kiel unua sekretario,
Růž. Herzigová, oficistino, Praha XI., Karlova 8, kiel dua sekretario,
Frant. Slavík, oficisto, Praha XIX., Urálské nám. 447, kiel kasisto,
Jos. Friedrich, fervoj-konsilanto, Košice, Jarná 20,
Dr. Jos. Fousek, advokato, Přelouč.
Oto Sklenčka, librotenisto, Hradec Král., Čelakovského 623,
Julie Šupichová, fak-instruistino, Praha II., Malá Štěpánská 6,
Anna Tarantíková, oficistino, Smíchov, Štefánikova 43,
Norbert Vaŝíĉek, poŝt-oficisto, Ústí nad Orlicí.

Vicmembroj:

Inĝ. Leopold Berger, Potštejn,
Sidonie Dlouhá, fervoj-oficistino, Praha 15, Wilson. nádraží,
A. Hejnová, oficistino, Praha II., Malá Štěpánská 6,
Josef Janda, Kolín I/79, Lidový dům,
Jaroslav Šustr, komercisto, Praha I., Dlouhá tř. 53,
Josef Vondrouŝek, bank-oficisto, Brno, Falkensteinerova 9.

### Kontrola komisiono.

Membroj:

Václav Bujárek, poŝt-oficisto, Nové Zámky,
Frant. Hanzelka, minej-oficisto, Lazy 6,
Dro Adolf Koneĉný, advokato, Jaroměř,
Frant. Novák, horloĝisto, Praha I., Malé nám. 10,
M. Weisskopf, komercisto, Praha I., Národní 37.

Vicmembroj:

A. Holancová, lernej-direktorino, Vyŝkov,
Frant. Růžiĉka, profesoro, Holeŝov,
Frant. Šádek, Jičín, Nové město 552.

En la ĝis nun okazintaj komitataj kunvenoj oni priparolis ĉefe la liberajn proponojn (vidu alvokon al ĉiuj E-kluboj en ĈSR), postkongresan vojaĝon tra Ĉeĥoslovakujo (vidu la programon de tiu ĉi vojaĝo en plua teksto!), sendis leteron al ministerio de instruado rekomendante sekve de lerneja reformo enkondukon de E. en la lernejojn, instigis la poŝtan ministerion al la uzado de E. ĉe internaciaj poŝtaj respondkuponoj, decidis memstare eldonadi „Bultenon de ĈAE“ sub redaktado de inĝ. Berger el Potŝtejn.

## KLUBA VIVO

La komitato de ĈAE adresas al ĉiuj E-kluboj kaj societoj en Ĉ. S. R. jenan alvokon:

*Al ĉiuj E-kluboj kaj societoj en ĈSR.*

En la ĝenerala kunveno de ĈAE, okazinta la 17. III. en Pardubice, prezentis sro Jandík el Pardubice proponon, ke ĉiuj ĉsl. esperantistoj organizitaj en E-societoj estu nepre ankaŭ membroj de Asocio. — La propono estis transdonita al la komitato de ĈAE por esplori ĝin kaj prepari por la venonta ĝenerala kunveno.

Tial la komitato de ĈAE turnas sin al ĉiuj E-societoj en Ĉ. S. R. kun la peto, ke oni priparolu la proponon en ĉiuj societoj okaze de la plej proksima komitata kunveno kaj respondu jenajn demandojn:

1. Ĉu la klubo estas preta kun tuta sia membraro aliĝi al ĈAE.
2. Ĉu la klubo pagus por ĉiu sia membro 8.- Kĉ jare komence de l'1. I. 1930.
3. Ĉu la klubo — se tiu ĉi organiza sistemo efektiviĝos — obeos la plimulton da societoj.
4. Ĉu la klubo havas aliajn eble proponojn, kiujn Asocio volonte prikonsideros.

Unuopaj membroj, en societoj neorganizitaj, pagus eĉ por estonte 16 Kĉ jare.

Al tiuj kluboj, kiuj konsente akceptas la proponon, ni rekomendas bone pripensi la aferon de propraj klubaj kotizoj, ke ĉie klubo sen grandaj malfacilaĵoj povu por ĉiu membro el la kotizo membra transdoni al ĈAE 8.- Kĉ jare.

Ni samtempe petas, ke ĉiu klubo elektu unu delegiton aŭ peranton de ĈAE (prefere komitatanon de l'klubo), kiu raportus al ĈAE pri loka E-movado, reprezentus ĈAE kaj akceptus ĉiujn gravajn novaĵojn de ĈAE.

Fondante vian societon vi memortenis forton kaj signifon de l'organizado. Des pli grava kaj por vi bone komprenebla estas ankaŭ centra organizaĵo — nia „Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista“, kiu reprezentas oficiale nian ĉeĥosl. E-movadon en — kaj eksterlande kaj kiu estas membro de Internacia Delegitaro. — Eluzi lokajn sukcesojn, sukcese labori por fina venko de l' Zamenhofa ideo, kapablas sole forta centra organizaĵo.

Ni atendas kaj ĝentile elpetas baldaŭan vian decidiĝon, kaj estas pretaj doni al ĉiuj eĉ pli detalajn klarigojn. Viaj respondoj servos kiel materialo por definitiva propono prezentota al estonta ĝenerala kunveno de ĈAE.

Kun samideanaj salutoj po ĈAE

J. Eiselt, presidanto. B. Bloch, sekretario.

**Esperantista Klubo** en Praha I., Na Perštýně 11, Odbor. dům, kunvenas ĉiu vendrede post la oka vespere. — Ĉiam riĉa programo, partopreno 30—50 personoj. Ĉiam agrabla renkontejo por la vizitantoj de Praha. — La klubo aranĝis ankaŭ dumonatan E-kurson (finiĝis 13. V. — instruis sroj Echtner, Šustr, fino Dandová, partopreno 20 personoj). Rimarkinda estas la biblioteko de la klubo, kiu enhavas pli ol 1200 E-publikaĵoj.

Ceteraj kluboj estas petataj sendi precizajn informojn pri sia agado, adresojn de funkciuloj, kaj lokon eĉ tempon de regulaj kunvenoj.

## ĈAE JUNULARA MOVADO

Raportas la gvidanto J. Novák.

Junulara fako de ĈAE funkcios laŭ la decidiĝo de la ĝenerala kunveno de ĈAE plu en la formo de junulara komisiono, ĉar ne estas konvena tempo por fondi memstaran organizaĵon de E-junularo ĉeĥosl.

Esperantaj funkciuloj, kiuj laboras inter la gejunularo, sendu kiel eble plej baldaŭ raportojn pri sia agado kaj pri

tiurilataj novaĵoj laŭ la adreso: Jaroslav Novák, Praha I., Malé nám. 10.

Lernejestro Václav Ŝkorpík en Kamenice n. L., denove kiel dum pasintaj jaroj instruas E. en 4.-a klaso de burĝa lernejo. — Lia imitinda fervoro donis al nia movado jam multe da samideanoj.

## *POSTKONGRESA VOJAĜO*
*tra Ĉeĥoslovakio*

Ĉiu partoprenonto ĝuos fervojan 33%-an rabaton, senpagan vizon (havebla ĝis en Budapest) rabatojn por enirpago al grotaro de Macoĥa kaj grotoj en Demänová, vidindaĵoj en Praha.

El Budapest forveturo de 2 karavanoj:

Ia karavano:

9./8. 1929. Ĉirkaŭ la 9a horo forveturo al Brno. Tie laŭtempe vizito de la ekspozicio pri modernaj komerco kaj reklamo, urbaj vidindaĵoj, amika kunveno kun la gesamideanoj kaj tranoktado.

10. 8. Matene forveturo al Blansko (fervojlinio al Praha) vizito de mondkonata gulŝtona grotaro de Moravia Karsto kaj abismego Macocha (Macoĥa). Ĉi tiu grandega, neniam finesplorita grota labirinto, plena da diversformaj kaj diverskoloraj gulŝtonoj, subteraj riveroj kaj lagetoj, postlasos en la memoro de ĉiu vizitinto neforgeseblan, profundan impreson. — Daŭrigo en la vojaĝo al Praha. — Tranoktado.

11. 8. Rondvojaĝo kaj vizito de la vidindaĵoj en Praha. Vespere amika kunveno kun la esperantistaro de Praha.

IIa karavano:

9. 8. 1929. Matene forveturo tra Hidasnémeti-Košice-Poprad al Ŝtrba. Alveturo je 20. horo. Frumatene, laŭ la decido de ĉeestontoj ekskurso al Rysy —7 horojn tien kaj reen. Belega, ne tre laciga ekskurso. Aŭ malpli longa ekskurso tra la valoj al Popradské pleso. Posttagmeze forveturo antaŭ 15a horo al Sv. Mikuláŝ (Sta Nikolao). De tie forveturo per aŭtobuso al valo „Demänová“, vizito al la grotaro, reveno al Sv. Mikuláŝ. Je la 20a aŭ 21a forveturo per rapidvagonaro (litvagone) al Praha. La 11an je la 8a horo matene en Praha. (Litvagono estas tre rekomendinda por povi ripozi, ĉar oni veturos la tutan nokton.)

La 11an de aŭgusto laŭ programo de la unua karavano.

Praha, ĉefurbo de Ĉeĥoslovaka respubliko, kuŝas sur ambaŭ bordoj de la rivero Vltava kaj estas konata pro siaj belaĵoj. La urbo estas plena da histori aj memoraĵoj. Multaj antikvaj altvaloraj konstruaĵoj en stiloj romana, renezanca, baroka k. a. dokumentas al ĉiu vizitanto la gloron de la urbo en tempo antikva — modernaj palacoj, pontoj kaj aliaj konstruaĵoj dokumentas la epokon modernan.

Multaj belaj parkoj estas vera ornamo de la rapide kreskanta urbo, en kiu ĉiu nacio trovas ion al si memorindan kaj karan.

Partoprenu multnombre la postkongresan vojaĝon tra Ĉeĥoslovakio! Ankoraŭ hodiaŭ sendu vian aliĝon! Tiuj, kiuj intencas veturi tra Slovakio kaj viziti la montaron Tatry, sendu kun sia aliĝo ian monsumon, minimume Kĉ 50.-, ĉar la efektiviĝo de ĉi tiu karavano dependas de certa nombro de fruaj aliĝoj. — Sendita mono ne perdiĝos: ĝi ne estas kotizo, ĝi estas nur garancio por via ĉeesto, ĝin oni dumvoje redonos. Dum la kongreso en Budapest oficos nia reprezentanto.

Ĝis la revido!

*KOMITATO*
*POR POSTKONGRESA VOJAĜO*
TRA ĈEĤOSLOVAKIO.

Adreso:
*Esperantista klubo en Praha I., Pernštýn 11.*

## *ALIA E-MOVADO*
*en Ĉeĥoslovakio*

En Marianské Lázně ap. Zviĉina okazis sukcesplena konferenco de orientbohemaj esperantistoj la 29. kaj 30. VI.

La societo „Esperanta amikaro“ gvidata de J. Ŝupichová publikigas regule en sabataj nroj de multe legata tagĵurnalo „Národní Politika“ esperantan kronikon „Z esperantského světa“ kaj preparas ĉeĥan informan broŝuron „Rádce ĉeského esperantisty“ (Gvidilo por ĉeĥa esperantisto).

BES en Potŝtejn eldonis poŝtkarte belan portreto de filma artistino A. Ondráková, kiu lernas esperanton. —

Ĉiu petinto ricevos senpage 1 ekzempleron. La sama eldonejo aperigos fine de julio novan „BES-Adresaron".

## *EL FREMDLANDO*

Bulgaraj samideanoj invitas al sia XVI.-a kongreso en Vidín, okazonta antaŭ la kongreso en Budapest, dum 28., 29. kaj 30. VII.

Vidin, lasta havenurbo sur la Danubo, bone konata per siaj antikvaj vidindaĵoj, estas survoje al Budapest. — La bulgara karavano ekveturos al la mondkongreso per ekspresa ŝipo la 30./VII. vespere.

## *EL LA REDAKCIO*

La redaktoro deziras esti en vigla kontakto kun la legantaro kaj elpetas ĉiuspecajn instigojn, konsilojn kaj kritikojn. — Precipe estas dezirinde ĝustatempe alsendadi raportojn pri E-movado de ĈSR eĉ de l'fremdlando. — Alsenditajn librojn, gazetojn kaj ĉiuspecajn E-presaĵojn ni citos kaj laŭeble ankaŭ recenzos. —.

Estonte ni volas ankaŭ enkonduki rubrikon „El kultura vivo de Ĉ. S. R." por liveri informojn pri ĈSR al eksterlanda gazetaro, kaj ĉeĥo-esperantan rubrikon „Lingva fako", kiu celos pliperfektigi niajn samideanojn en la uzado de nia lingvo. — Grava ankaŭ estos por nia ĉeĥa gazetaro ĉeĥlingva kroniko de E-movado, kiun ni ekkomencos en la sekvanta nro.

## *EL LA ADMINISTRACIO*

Nia „Bulteno" estante oficiala organo de ĈAE ĝuas plenan fidon ĉe siaj membroj kaj havas plej grandan disvastiĝon ĉe l'samideanoj de ĈSR.

Pro tio ĝi estas rekomendinda anonca gazeto. — 1 paĝo kostas 300.— Kĉ, 1/2 paĝo 160.— Kĉ, 1/4 pĝ 90.— Kĉ, 1/8 pĝ 50.— Kĉ.

Tiun ĉi numeron de nova „Bulteno" ricevos ĉiu membro de ĈAE kaj ĉiu petinto en la espero, ke li fariĝos ankaŭ membro de „ĈAE" por 16.— Kĉ jare subtenante per tio la gravan ideon de koncentriĝo de ĉeĥosl. esperantistoj.

Bl.

## *JUS APERIS*

**UEA-jarlibro 1929** denove aperis kiel ampleksa libro kaj estas vere por ĉiu Esperantisto praktika bezona helpilo. La delegita adresaro estas nunjare aranĝita laŭ la landoj. — La ĝenerala parto de Ĉeĥoslovakujo enhavas abundajn sciigojn pri neaperantaj gazetoj („La Progreso", „Teritoria Tribuno", „Ĉeĥoslovaka Preso Esperanta"), sed eĉ ne unu vorton pri „BES-Adresaro" kaj pri aperantaj gazetoj „Esperantský Svět" kaj „Kalejdoskopo de l' vivo". La adresa parto de Ĉeĥoslovakujo estas rilate lingvan flankon malpli laŭdinda ol antaŭe, ĉar ĝi senbezone uzas — ŝajnigante neŭtralecon kaj bezonecon — pli da germanaj eĉ magiaraj urbonomoj ol pasintjare.

**Hungara Heroldo, nro 4, el** 28. VI. 29, oficiala organo de XXI-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapest (2.—9. VIII. 29). Ĝi enhavas statistikon de kongresanoj. — Aliĝis ĝis 25. VI. 366 esperantistoj el 27 ŝtatoj, nome el Eŭropo 352 (Ĉeĥoslovakujo 35, Hungarujo 46, ceteraj landoj 271), el ekstereŭropaj landoj 14.


*SAMOZŘEJMOU POVINNOSTÍ*

*každého českého esperantisty jest*

*býti členem*

**„Svazu československých esperantistů".**

Roční příspěvek 16 Kč.

Zdarma „Věstník". — Členské premie. — Propagace, pořádání přednášek, výstav a kursů. — Sekce literární, vědecká a dorostenecká. — Informace o zakládání klubů, o zkouškách.

Veškeré dotazy vyřídí

*ADMINISTRACE „VĚSTNÍKU"*

PRAHA XII., Londýnská 13.



Věstník ČAE vychází 4—6 krát ročně a je zasílán členům zdarma. — Redakce v Potštejně č. 124, administrace v Praze XII., Londýnská 13. Le „Bulteno de ĈAE" aperas 4—6 foje dum jaro. Por membroj de ĈAE senpaga. — Nemembroj pevas boni por 16 Kč (2·50 Fsr) jare. — Redakcio: Potštejn 124 ĈSR. Administracio: Praha XII., Londýnská 13, ĈSR. — Tiskl Jan Minář Nymburk. — Novinová sazba povolena řed. pošt a telegrafů v Praze čís. 158.620-VII.